

ESPERANTO PROVENCE

Numero 91 – Vintro 2012/2013

4 numeroj/jare

redaktoro:

Pascal Vilain

p.vilain83@orange.fr

61 montée du Castelar

83460 TARADEAU

04 94 73 33 24

kasisto:

Michel Cerisay

mcerisay@gmail.com

15 Place des Vents Provençaux

13140 MIRAMAS

baza kotizo al la Federacio (kun bulteno): 6 eŭroj

VORTO DE LA PREZIDANTO

Feliĉan Novan Jaron al vi kaj viaj familianoj ! Sanon, sukcesojn en viaj Esperantaj agadoj.

Granda laborkampo atendas nin : MARSEJLO estis elektita « Eŭropa Kultura Ĉefurbo 2013 », laŭ titolo donita por unu jaro al urbo de la Eŭropa Konsilio (aŭ al du urboj, la alia ĉijare estas Košice en Slovakio).

Ni esperu, ke tiu jaro signifos por ni progreson de nia lingvo en la P.A.C.A.-regiono, danke al niaj partoprenoj en kelkaj okazaĵoj, kiujn ebligis tiu grava Marsejla evento.

Pierre Oliva

ATTENTION / ATENTU

N'oubliez pas de payer la cotisation de 6 € à Espéranto PACA pour l'année 2013, soit par l'intermédiaire de votre groupe local, soit directement à notre trésorier, Michel Cerisay (formulaire d'adhésion joint à ce bulletin). Merci !

Ne forgesu pagi la aliĝkotizon – 6€ - al Esperanto-PACA por la jaro 2013, ĉu pere de via loka asocio, ĉu rekte al nia kasisto, Michel Cerisay (aliĝilo aldonita al ĉi-bulteno). Dankon !

**Membro-Kunveno je la 10a de Marto
en Les Issambres, Résidence Val d'Esquière – je la 14a30**
(okaze de la Mediteranea Esperanto-Semajno)

eblos tagmanĝi surloke – prezo : 20 €

Kunvokilon kaj rajtigilon vi trovos fine de la bulteno ; la tagordon kaj la diversajn raportojn pri la jaro 2012 sendos al vi Monique Arnaud ĉu rete ĉu letere.

125 ANS... ET DEMAIN ?

La saison estivale a été marquée, comme chaque année, par la tenue du Congrès Mondial de l'Association Universelle d'Espéranto qui s'est déroulé cette fois à Hanoï, au Vietnam.

Voici la résolution de ce 97^e Congrès, adressée à tous les espérantistes :

« 125 ans après son lancement, l'espéranto construit des ponts vers un monde plus juste et plus pacifique. »

Réunis à Hanoï du 28 juillet au 4 août 2012, plus de 800 participants en provenance de 62 pays ont confirmé l'importance de l'utilisation d'une langue construite sur les idéaux de paix, d'amitié et de respect mutuel.

Pour des personnes issues de pays et d'horizons sociaux les plus divers, l'espéranto propose un outil pratique et performant pour des contacts directs menant à la découverte de l'autre et à de profondes amitiés.

Pour un monde où abondent encore les conflits et les injustices, l'espéranto propose une culture de paix à laquelle contribuent des hommes et des femmes de tous les continents dans un esprit de collaboration équitable.

Pour la communauté internationale qui s'efforce d'atteindre les Objectifs du Millénaire pour le Développement, buts fixés par l'ONU, l'espéranto propose une voie intéressante pour un partenariat mondial au sein duquel collaborent non seulement des États avec

des États, mais des personnes humaines avec des personnes humaines.

125 ans après son apparition, l'espéranto est de plus en plus utilisé comme pont vers l'amitié, la paix et le développement ; cette évolution est accélérée par l'extension d'un autre moyen de communication mondial : Internet. On peut le constater entre autres par l'ajout de l'espéranto comme 64^{ème} langue dans l'outil de tra-

duction de Google.

Nous invitons tous les citoyens et citoyennes de tous les pays à utiliser et à consolider ce pont, dans le but de créer un monde plus juste et plus pacifique où s'épanouissent et cohabitent toutes les langues et toutes les cultures. »

el Esperanto, tradukis Mireille Grosjean

EL NIAJ FEDERACIAJ ASOCIOJ (KAJ TIES ANOJ)

04 - Esperanta Kulturo en Manosque

Permanence et cours le premier et le troisième mercredi de chaque mois de 17h30 à 20h à la Maison des Associations de Manosque. Préparation aux examens. A la demande : expositions et présentations de la langue. Contact : 04 92 72 39 89, 04 86 90 24 97.

Journées du Patrimoine

Notre groupe de Manosque a tenu un stand au théâtre de verdure du Parc de Drouille, le samedi 15 septembre 2012, avec la participation d'amis d'Aix-en-Provence que nous remercions chaleureusement, d'autant plus qu'ils nous firent la surprise d'arriver les mains pleines.



La budo de EKEM

Jules Verne et l'espéranto

Samedi 13 octobre 2012 a eu lieu à la médiathèque de Manosque une conférence sur le thème " La géographie selon Jules Verne ", à laquelle nous avons assisté, Bernard Greck et moi, avec le livre San Carlos sous le bras.

Nous avons été surpris d'entendre le conférencier le dr Paul Chapoy, parler, brièvement quand-même, de la sympathie de Jules Verne pour l'espéranto.

A la fin de l'exposé, je me suis permis d'ajouter que

Jules Verne avait été président d'honneur du club d'espéranto d'Amiens, chose que le conférencier a dit connaître, bien qu'il ne connaissait pas l'ouvrage "San Carlos". La directrice de la médiathèque de Manosque et de l'agglomération de communes a été très intéressée par ce qu'elle venait d'apprendre et m'a demandé les références du livre pour l'avoir dans ses rayons.

(plia rimarko pri tio : Jean-Marc Ayrault, la nuna ĉefministro, favoris la eldonon de la libro "San Carlos" kiam li estis urbestro de Nantes (laŭ la tri lastaj linioj de la paĝo 287 de la citita libro). Ĉu li nun povus eble helpi la esperantan movadon ?)

Stage

Comme il a coutume de le faire, le club manosquin a organisé un stage d'espéranto le samedi 17 novembre, de 9h30 à 17h, avec repas tiré du sac.

Dixième anniversaire

Pour ses 10 ans, EKEM offre une bourse d'un montant total de 200 € à deux élèves volontaires pour participer à FESTO, la fête de la rencontre JEUNES, qui se déroulera du 10 au 17 août 2013 à Kémis, à 5 kilomètres d'Aix-la-Chapelle.

Pour plus d'informations, contacter José Grammatico (04 92 72 39 89 - josephgrammatico@neuf.fr) ou Patrick Lagrange (04 92 73 38 14 -

pathenri.lagresper@orange.fr)

Nome de la federacio, gratulojn al IKEM okaze de tiu dekjariĝo !

Projekto

La 1an de Februaro, IKEM iĝos partnero de la Manosque-a turismoficejo.

Sekve okazos en tiu loko Esperanta semajno, de la 18a ĝis la 23a de Marto (9a30 – 12a30 / 14a – 18h30). Eblos surloke saluti anojn de la loka Eo-klubo.

pri ĉiuj eventoj en Manosque raportis José Grammatico

05 – Esperanto-Gap

Foiro « Généri » – Embrun 8an /9 an de Septembro

Esperanto-Gap starigis tre malgrandan budon sed kaptis la okazon ĉefe informi la vizitantojn pri Esperanto, pri la venonta prelego de Renato Corsetti kaj Anna Löweinstein en Gap kaj en Saint-Bonnet en Champsaur kaj kolekti subskribojn por la peticio : « L'espéranto au bac ». Pli ol 40 subskriboj estis kolektitaj. Ĉar ne okazos kursoj en Gap en 2012/2013, mi ne kolektis poŝt-aŭretadresojn, sed mi tamen prenis la adresojn de homoj, kiuj serioze interesiĝis pri la lingvo, kaj plusendis al ili pliajn informojn... ekz. pri konferenco de Hannes Larsson en Nyons la 22an de Novembro kadre de « [Université Nyonsaise du Temps Libre](#) », por junulino kiu loĝas en tiu urbo.

Sed por tion fari, oni nepre alvoku la preterpasantojn !



Monika A. en Embrun

2012.09.19/20/21 - Raporto pri la prelekturono de Anna Löwenstein kaj Renato Corsetti en 05.

Anna kaj Renato alvenis veturite al Gap. Ni rendezvuis apud lernejo kaj de tie vizitis amikino Evelyne. Je la 18a ni veturis al Salle Dum'Art ; tie alvenis deko da homoj, inter ili Michel E. el La Ciotat, tri esperantistoj, instruistino pri latina lingvo en la lernejo de St-Bonnet kaj ĵurnalisto. Li restis ĝis la fino de la prelego, estis tre interesita sed poste aperis tre mallonga raporto kaj tute ne trafa foto !

Ĵaŭdon matene, ekde la 8-a, Renato alparolis la lernejanojn en la itala ; li vizitis alian grupon poste. Anna prezentis bildojn pri « La Antikva Romo » al kvindek da infanoj, la lingvon « Esperanto » al alia kvindek da

lernantoj en la mezgrada lernejo de St-Bonnet en Champsaur. Anna kaj Renato estis bone akceptitaj de la nova estrino, tagmanĝis en la lernejo. Posttagmeze Anna prezentis la lingvon al du klasoj de elementa lernejo - nivelo CM1, CM2 - entute al pli ol kvindek infanoj. Ili tre interesiĝis. Kvankam ni bone informis la infanojn, vespere venis nur unu patrino - mi konatiĝis kun ŝi dum la foiro en Embrun. Anna prezentis al ŝi kaj al la respondeculino de « Planète Champsaur » rapidan prezenton de Esperanto. Vendredon posttagmeze ni vizitis « Cafépicerie » la Juncha, survoje al Orcières-Merlette. Tie ni renkontis « kabeintan » esperantiston - ankaŭ ŝin mi vidis en Embrun kelkajn tagojn antaŭe. Ŝi planas denove paroli Esperante !

Kiam Esperanto-Gap venigas prelegantojn, mi ĉefe zorgas pri renkontiĝo en lernejoj. Tie kuŝas nia estonteco. En la dokumentejo estas malgranda Esperanto-sekcio.

« Ni semas kaj semas, neniam laciĝas pri l' tempoj estontaj pensante. »



Monika, Anna kaj Renato antaŭ lernejanoj

Le Dauphiné Libéré 22 septembre 2012

LANGUE Conférence avec le club de Gap

Quel avenir pour l'esperanto ?

Mercredi, le club esperanto de Gap avait invité Renato Corsetti. Le conférencier est un espérantiste et linguiste italien, ancien président de l'Association universelle d'esperanto (2001-2007). Au cours de son exposé, en esperanto et traduit simultanément par Monique Arnaud, il a fait preuve d'optimisme pour l'avenir de la langue universelle qui connaît un grand développement en Afrique, en Amérique du Sud et en Asie. En Europe, on constate que de nombreux étudiants apprennent facilement cette langue à l'aide d'internet.



Une partie des Espérantistes entoure le conférencier, Renato Corsetti.

G.M.

« Le Dauphiné Libéré » raportis pri la evento, « Anna Löwenstein kaj Renato Corsetti en 05 » sed eraris : Renato Corsetti ne estas sur la foto. pri ĉiuj eventoj en Gap raportis Monika Arnaud

13 - Espéranto - La Ciotat

Forumo de asocioj

Ĝi okazis en La Ciotat, sabaton la 8an de Septembro.

Bone lokita budo, tre vizitata (ni havis tendon kun videbla flago « espéranto-langue équitable »), des pli ke ni estis inter la malmultaj, kiuj alvokis la preterpasantojn, informis, lasis dokumenton (kalendaro). 120 subskriboj estis kolektitaj por la peticio. Tute evidente, se la homoj jam aŭdis pri Esperanto, ili pli facile subskribos. Ĝenerale temas ĉu pri maljunuloj, ĉu pri iamaj studentoj. Mi ekz. sisteme faris demandon al 8-10jaruloj, kaj kompreneble la gepatroj aŭskultis.



la budo en La Ciotat

Neatendita vizito de junaj esperantistoj.

Martin el Ĉekio staĝas en Liono, Elena el Rusio en Grenoble. Ambaŭ praktikas Esperanton kaj decidis viziti Provencon dum novembraj ferioj. Eĉ se la vetero estis malhela kaj pluveca, ili rapide promenis tra La Ciotat, en la bieno de Renée, por pluki fungojn kaj malkovri la lokajn plantojn. Ne vere ilia specialaĵo. Martin fakas pri atomfiziko kaj ricevis stipendion Erasmus por staĝi en Liono. Ankaŭ Elena ricevis stipendion "Erasmus-mondan" ĉar Rusio ne apartenas al Eŭropa Unio : ŝi studas urbanizadon, kaj malkovris urbeton de la XVIIa jarcento. Dum la manĝo, kiun povis partopreni Loukie kaj Alain, oni multe diskutis pri vojaĝoj kaj kontaktoj. Tiuj junaj esperantistoj estas tipaj produktaĵoj



Renée, Martin kaj Elena

de la nuna generacio : ili flue parolas la lingvon, regule uzas ĝin dum vojaĝoj kadre de Pasporta Servo sed apenaŭ scias, ke ekzistas movado, asocioj, gazetoj.

Staĝo

Intensiva 10-hora Eo-staĝo, gvidata de Renée Triolle, okazis en La Ciotat la 20an kaj 21an de Oktobro.

LA MARSEILLAISE - éd. Aubagne & La Ciotat

page 6

mardi 4 décembre 2012 La Marseillaise

La Ciotat

Actualité

Sport. Alain Rémy est venu raconter son tour du monde à vélo couché.

L'aventurier s'est livré au Grand portique

■ Près de deux mois après son retour, Alain Rémy était vendredi dernier au Grand portique pour narrer son voyage de huit mois autour du monde, à travers huit pays et en vélo couché. Un périple préparé sans tambour ni trompette, et sans sponsor. Exploit sportif? Pas vraiment «*plutôt une aventure humaine*», déclare l'ancien directeur de l'école de la Garde, qui racontait là son périple pour la première fois depuis son retour (voir *La Marseillaise* du 22 octobre dernier).

Invité par le Grand Portique et Espéranto-La Ciotat, il a conquis le public venu nombreux. Partout, le vélo couché attire la curiosité et suscite des questions. Parmi les aventures, le point de vue du cycliste apparaît : mauvais état des routes et froid en Ukraine, ébou-

lement de terrain ou construction d'autoroutes en Chine, forte chaleur aux États-Unis, où l'on ignore les cyclistes.

Mais aussi le point de vue de l'humaniste qui au fil des jours et des kilomètres rencontre les gens : vieux amis espérantistes en Hongrie, fête de famille au Kazakhstan, cyclistes malais en route pour les JO de Londres, représentant chinois d'une grande marque française, famille de militaires à Washington...

Le tout narré avec verve, humour et anecdotes comme lorsqu'il présente les panneaux publicitaires le long des routes : le président kazakh super-star, la faucille et le marteau en Russie ou les religions aux États-Unis, où Dieu est présent partout même pour les ventes d'armes...



Photos à l'appui, Alain Rémy a résumé huit mois de voyage en deux bonnes heures

artikolo de La Marseillaise pri Alain Rémy

Humurplena rakonto pri vojaĝo ĉirkaŭ la mondo

Delonge homoj revas pri rondvojaĝo ĉirkaŭ la mondo. Sed Alain Rémy el *Espéranto-La Ciotat* ĝin faris... per biciklo ! Imagu : 22000 km dum 8 monatoj tra 8 landoj !

Unuan fojon post sia reveno, pri kiu raportis la lokaj gazetoj (*La Provence*, *La Marseillaise* kaj *Var-matin*) li prezentis al la publiko, la 30an de Novembro, fotojn de tiu aventuro. Spritaj komentoj partoprenigis la ĉeestantaron en tiu malfacila sed ĉiam interesplena vojaĝo.

Malgraŭ la malvarmo en Ukrainio aŭ la varmego en Usono, malgraŭ la malbona stato aŭ simpla foresto de vojoj li biciklas, renkonte al la homoj. Ĉar tio klare aperas : parolante aŭ paroletante la anglan, rusan, ĉinan kaj evidente Esperanton, li komunikas : kun jam konataj homoj, kiel en Hungario, Rusio aŭ Ĉinio, aŭ simple kreas kontakton. Lia kuŝbiciklo altiras la atenton, scivelemon kaj demandojn kaj jen la eko de invito al familia festo en Kazakhio aŭ loĝado ĉe soldatoj en Usono ! Lia raporto el selektitaj fotoj montras, ke ne mankas laŭvoje paneloj : pri la Prezidento-superreganto en Kazakhio, Lenino en Rusio, sloganoj en Ĉinio sed ĉefe Dio(j) en Usono !

Alain Rémy volonte intervenos en viaj urboj ; proponu tiun duhoran prelegon al diversaj instancoj . Rilatu kun *Espéranto-La Ciotat*, kiu transdonos :

esperanto.laciotat@wanadoo.fr

Koncerto

Jo Mo en concert à La Ciotat le mardi 26 février à 20.30 - Théâtre du Golfe

Entrée 12 € ou 40 € pour 4 . réservations
au 04 42 71 42 74

ou esperanto.laciotat@wanadoo.fr

JoMo est entré dans le livre des records car il chante en 22 langues. Engagé pour la défense de l'occitan et de toutes les langues, il sera ce soir-là accompagné d'un musicien ukrainien.

pri ĉiuj eventoj en La Ciotat raportis Renée Triolle

13 - Espéranto – Marseille

« Vivacité », la Marsejla forumo de asocioj

Forumo de asocioj en Marsejlo okazis la 9an de Septembro 2012 en Parko Borely. Unua konstato estas, ke ĝi estas pli kaj pli bone organizita laŭ la jaroj. Kiel kutime, la vetero estis bona, kaj multaj homoj vizitis la forumon. La budo de *Espéranto-Marseille / Espéranto-Provence* estis en pli bona loko ol antaŭe : ni estis proksime de la enirejo de la forumo.

Ni uzis la tendon de la Provenca Federacio, kiu tre taŭgas por ŝirmi la deĵorantojn kontraŭ suno sed ankaŭ altiras atenton kaj permesas pendigi flagon kaj

aŭfiŝojn videblajn de la promenantoj.

Deĵoris homoj el Marsejlo kaj La Ciotat (Renée, Pierre, Astrid, Jo, Philippo, Alber, Thierry), kaj ne atendite, juna Aŭstralia esperantisto, Keke, nun laboranta en Finnlando. Kvankam li ne parolas la francan, li tre efike reklamis kaj varbis ! Centoj da anoncoj pri la prelego de Renato Corsetti kaj Anna Löwenstein la postan mardon estis distribuitaj kun aldonaj komentoj pri du-lingvismo, neceso je justa lingvo ktp. Ni ankaŭ subskribigis la peticion (40 subskriboj kolektitaj) kaj varbis pri niaj kursoj. Multe da vizitantoj ŝajnis tute interesataj pri Esperanto. Espereble tiu varbo estos efika !

Ni havis bonajn kontaktojn kun instruistinoj de teknika liceo en Marsejlo, kiuj petis ĉu eblas kunlabore proponi iun agadon dum lerneja jaro (ekz. konsciigo pri multkultureco, edukado al paco, tekniko por lingvo-lernado), kaj kun firmaestro.

raportis Renée T. kaj Thierry S.



bone vizitata budo en « Vivacité »

Deux "pointures" de l'espéranto ans notre région

Pour commencer l'année scolaire en fanfare, *Espéranto-France* avait invité deux espérantistes de renommée mondiale à faire une tournée de conférences dans notre région : Marseille, La Ciotat et Gap.

Renato Corsetti, ancien Président de *Universala Esperanto-Asocio*, membre de l'Académie d'espéranto, est psycholinguiste à l'Université de Rome. Donc il sait ce dont il parle quand il présente "Langues et cultures : quelle place pour l'espéranto ?". Son argument : le latin, langue de communication au Moyen-Age, a disparu ; à la Société des Nations, la France a enterré par son veto l'espéranto qui ne s'est jamais aussi bien porté (une des 30 langues les plus parlées au monde, au

tour de la 15ème sur Internet) ; l'anglais d'aujourd'hui doit céder la place au chinois. Mais la langue est très difficile. Dans les projections de l'OCDE, en 2050 il y aura en Europe 250 millions de plus de travailleurs étrangers, quelle(s) langues utiliseront-ils ? La leur ? Celle du pays d'accueil ? Un pidgin ? L'espéranto a survécu et survivra car il occupe une niche à part: pas d'idée d'impérialisme, ni de domination, mais un lien humaniste entre les hommes.

Anna Löwenstein, Anglaise, vit à Rome. Elle aussi est membre de l'Académie d'Espéranto. Engagée, notamment dans la défense de l'allaitement maternel, elle est romancière, auteur de livres écrits directement en espéranto ; " La ŝtona urbo", "la ville de Pierre", a été traduit en français ; il raconte l'histoire d'une Anglaise, enlevée par la soldatesque romaine, esclave à Rome au moment de la naissance du christianisme. " Morto de artistoj " (La mort d'un artiste) nous place à nouveau dans la Rome Antique, sous l'empire de Néron et les jeux du stade. C'est d'ailleurs sur la Rome Antique qu'elle est intervenue trois fois dans des classes du collège de Saint-Bonnet (05). Une façon aussi de démontrer que l'espéranto est une très bonne langue littéraire qui permet d'exprimer toutes les nuances.

Anna et Renato utilisent l'espéranto dans la famille, ainsi leurs deux fils (l'aîné enseigne actuellement l'anglais en Chine, le second fait des études de physique au Portugal) sont trilingues : espéranto, anglais, italien.

Ce fut donc une rencontre très enrichissante sur bien des points que nous a permis Espéranto-France, organisateur de cette tournée de conférences.

raportis Renée Triolle



Anna kaj Renato en La Ciotat

Renée videble samopinias kun Anna kaj Renato pri la

uzo de nia lingvo, ĉar ankaŭ tion ŝi skribis :

« Esperanto vere tutmondiga : vidu la Universalan Kongreson en Hanojo aŭ kursojn en Afriko. Sekve ne eblas konstante krei neologismojn surbaze de Eŭropaj (ofte francaj aŭ anglaj) radikoj. Prefere uzi "la bonan lingvon", t.e. la lingvon de la Fundamento kaj pripensi kunmetaĵojn. Post vizito de Renato Corsetti kaj Anna Löwenstein, mi konsilas al vi rigardi la TTTejon : <http://www.bonalingvo.org> »

JoMo

Asocio de Okcitanoj planas inviti JoMo-n en Junio por koncerto en Marsejlo. Pliaj informoj sekvos verŝajne en la venonta bulteno.

83 - Esperanto-Klubo de Fréjus-Saint-Raphaël

Zamenhof-tago

Kiel kutime, iom pli ol dudeko da samideanoj kunigis sub la stratŝildo « Rue Zamenhof », en Saint-Raphaël, por omaĝi al la iniciatinto de nia lingvo. Ĉiuj poste ĝuis bongustajn pladojn en restoracio de Fréjus, antaŭ ol kune pasigi agrablan posttagmezon en Esperanta etoso.



la grupo de Fréjus – Saint-Raphaël

Reĝkuka festo

Le Club Espéranto Fréjus - Saint-Raphaël vous invite à partager la galette des Rois et à participer à l'assemblée générale de l'association le samedi 26 janvier chez Pierrot et Monique Prezioso à 14 heures.

Pour ceux qui désirent passer plus de temps en « Esperantio » : Repas tiré du sac. Vous pourrez arriver à partir de 11h30.

Pour s'inscrire téléphonez au 04 94 83 06 88 ou 04 94 95 66 18

83 – Espéranto – Le Beausset

Bonega novaĵo ! Nova asocio ĵus estis starigita en la departemento Var : jam multaj eventoj okazis en Le

Beausset, danke al la Nicole Lafitte kaj Pierre Oliva, kaj nun oficiale ekzistas tie Esperanto-klubo. Vi legos pli prie en la printempa bulteno.

Forumo de asocioj

Ĝi okazis la 14an de Septembro. Kiel kutime, ni renkontis multe da personoj en tre bona etoso kaj perfekta organizo. Ni ege dankas Renée Triolle, kiu helpis nin la tutan tagon.

Nicole L. kaj Pierre O.



Nicole kaj Renée kun ontaj junaj esperantistoj ?

Staĝo

La 24an kaj 25an de Novembro 2012 okazis en Le Beausset dutaga staĝo. Ĉirkaŭ 25 personoj kunvenis en granda domo, meze de la vilaĝo. La loko estas tre agrabla kaj kvieta. Ni parkumis la aŭtojn sub grandaj arboj en la bela parko malantaŭ la domo.

Ekde la alveno, sabaton, ni povis trinki kafon aŭ teon kaj manĝi lunarkan bulkon aŭ biskviton. Post vojaĝo apenaŭ 150 kilometrojn longa, mi ĝuis tiun bonvenan akcepton kaj plezure ni babilis kun konatuloj kaj novuloj.

Fine, post la alveno de ĉiuj partoprenontoj, ni iris en la salonojn, kie la gvidantoj de la staĝo atendis nin.

Nicole Lafitte incis novulon al Esperanto. Domaĝe, nur unu deziris eklerni nian lingvon. En alia salono, Josée Lafosse celis paroligi la grupanojn.

Mi partoprenis en la grupo gvidata de Françoise Noireau. Ni provis verki amuzajn aŭ fantaziajn tekstojn diversmaniere : ĉiuj kune, ni cerbumis, sed ankaŭ duope aŭ unuope laŭ la temo proponita de Fransuaz'. Laŭte ni legis niajn "verketojn", amike korektitajn de nia gvidantino. Dimanĉon, matene, ni ne havis tempon trakti la lastan temon. Feliĉe ! Imagu : Fransuaz' asertis, ke Sinjoro Zamenhof mem sendis al ŝi me-

saĝon, por ke ni "ĉinigu" la Esperantan lingvon ! Mi lasas vin imagi la masakron, la fuŝaĵon de tia entreprenon. Certe, nia kara majstro funebraspektus se ni sekvintus la instrukciojn de Fransuaz'.

Pli serioze, ni povas vere aplaŭdi kaj gratuli Pierre kaj Nicole, kiuj preparis la diversajn manĝojn kaj faris sian tutan eblon por plezurigi nin. Ni tre bone manĝis. Dankon.

Sabaton, en la vespero, Thierry Spanjaard kondukis nin en Vjetnamion dank'al tre belaj fotoj faritaj okaze de la U.K. en Hanojo, en kiu li partoprenis. La klarigoj estis tre interesaj : vidinda raportaĵo.

Post tiom bone plenigita tago, neniun bezonis lulkanton por dormi en simplaj kaj komfortaj ĉambroj. Ĝis la venonta jaro !

raportis Rose-Marie Quintin



mirinda staĝejo !

kaj pliaj vidpunktoj :

Mi zorgis pri vera komencanto, instruisto pri artoj en Marsejla universitato, kiu deziris kiel eble plej kompletan sed ankaŭ distran prezenton de nia lingvo. Kvankam li ne povos ĉeesti en niaj kursoj, li intencas malkovrigi Esperanton al sia juna filo. Je la fino de la staĝo, li esprimis sian kontentecon kaj restos en kontakto kun Pierre ĉar ambaŭ partoprenas en la sama pentro-ateliero.

Nicole L.

La staĝo estis sukcesplena kaj kontentiga por ĉiuj. Ĉirkaŭ la manĝotablo ni estis 24, sabaton tagmeze. La staĝejo troviĝas en grandega parko kun mirindaj arboj. La gelernantoj kiuj dormis surloke estis feliĉaj kaj ni havis tre bonajn kondiĉojn por la trikursoj ; la klasĉambroj sufiĉe grandaj kaj komfortaj. La gelernantoj estis kontentaj pri la enhavo de la diversaj kursoj ! La akcepto de Pierre kaj Nicole estis tre amika kaj la

etoso dum la tuta daŭro de la staĝo estis bonega kaj la manĝoj preparitaj de Pierre plaĉis al ĉiuj. Li ricevis varmajn gratulojn pri la elektita loko por starigi la staĝon, la organizado kaj la bongustegaj manĝoj.

Konklude, ŝajnas ke ĉiuj partoprenintoj bonvolas reveni en "Le Beausset" venontjare.

Josée kaj Michel



iom da konsoligo post la laboro

« Téléthou » en Le Beausset

Okazis trezorĉasado tra la vilaĝo la 8an de Decembro. Ĉe budo, Pierre, Alain kaj Nicole vigligis Esperanto-ludon por malkovrigi kaj ekpraktikigi nian lingvon. Sep teamoj partoprenis en ĝi kun tiom da plezuro, ke kvar personoj ŝatus partopreni en venonta kurso en nia vilaĝo. Ni esperas, ke tio efektiviĝos...

raportis Pierre O

Exposition

Une exposition sur l'espéranto se tiendra au Centre Saint-Exupéry, la Maison de la Culture du Beausset, du 2 au 9 février. Ouverte de 9h à 12h et de 14h à 19h, cette exposition présentera, outre des affiches explicatives sur la plus facile des langues vivantes, des petits films vidéo sur différentes rencontres internationales et des objets venus du monde entier.

Une séance d'initiation à l'espéranto est prévue tous les jours de 18 à 19 heures.

Le vernissage aura lieu vendredi 1er février à 18h30 et sera précédé d'une visite guidée de l'exposition à 17h45.

informis Pierre O

AGADO DE GEFEDERACIANOJ EN ALIAJ LOKOJ

La Seyne-sur-Mer (83)

La 7an kaj 8an de Septembro, Françoise Noireau partoprenis en la 5a Salono « Environnement et Partage » kun sia budo de la asocio « Désir d'apprendre ».

Pli da informoj pri tiu asocio, kiu interalie ebligas malkovron de Esperanto, ĉe:

www.wix.com/desirdapprendre/desir-d-apprendre

Pri tiu Salono, ni ricevis ankaŭ la sekvan raporton, senditan de Renée T. :

Dank'al lerninto de Esperanto, Greg, ni estis informitaj pri tiu forumo, kiu ĉefe kunigis ekologion, defendon de la medioj ktp. Iu faris al ni la demandon : "Kial vi, en tiu loko ?"

Dimanĉe vizitis la Forumon milo da homoj, inter ili 200 preterpasis nian budon kaj 50-60 restis por plia informado. Dudek ses subskribis la peticion. Kiel kutime, iuj aŭdis pri Esperanto kaj supozas, ke ĝi malaperis ; iuj neniam aŭdis eĉ la vorton sed estas sciivolemaj. Tre malmultaj ne scias kaj tuj respondas : "tio ne interesas min ".

Demandaro por infanoj, ia trezorĉasado, enhavis demandon : « Comment dit-on "salut" en espéranto » ? Do dekoj da infanoj venis al ni ; respondo ili trovis ĉu legante dokumenton, ĉu legante la kalendaretojn ; iuj tamen pretis aŭdi, ke Esperanto estas internacia lingvo !

vo !

Lunde vizitis tute alia publiko : lernejoj, inter 5 kaj 12 jaroj. Kaj mi konfesas, ke mi ne tro sciis, kion diri al 5jaruloj ! Al la pli aĝaj, mi povis rakonti la vivon de Zamenhof, ludigi per mal- aŭ -ino, montri la verbojn. Sed 5 klasoj (dek grupoj) kaj iliaj instruistinoj aŭ akompanantoj aŭdis pli.



*Eo
Budo
En
La Seyne
Sur
Mer*

Taradeau (Var)

Okaze de la Novjara ceremonio organizita de la vilaĝa konsilantaro la 11an de Januaro, bondeziroj estis eldiritaj en pluraj lingvoj parolataj de loĝantoj, kiuj devenas de aliaj landoj.

Kaj kiel kutime, post tiuj diversaj lingvoj (la norvega, pola, itala, germana, nederlanda, okcitana...) la novjaraj deziroj estis lastrange donacitaj en Esperanto al la tuta ĉeestantaro, kvazaŭ por emfazi, ke ponto povus ekzisti por faciligi la komprenon inter ĉiuj tiuj malsamaj parolesprimiloj.

Michèle Freud, kiu havis la kutimon fari tion jam de multaj jaroj, petis ke ĉijare mi alparolu la publikon en la internacia lingvo.

Pascal V.

Mazara del Vallo (Italio)

Monika Arnaud volontulis por instrui en tiu Sicilia

urbo kaj raportos pli detale en la sekva bulteno, sed vi jam povas legi pri tio pere de ĉi ligo : [www.esperanto.it/cei/ sub la titolo](http://www.esperanto.it/cei/sub_la_titolo) : "Volontulado en Mazara del Vallo pere de Grundtvig – Vizitoj kaj Interŝanĝoj".

Vaunières

(apud Saint-Julien en Beauchêne - 05)

La 27an kaj 28an de Oktobro okazos internacia staĝo en tiu vilaĝo. La estro de la staĝo bone rilatas kun esperantistino, kiu regule informas lin, kaj li proponas al esperantistoj partopreni, organizi intensivan staĝon por liaj kunlaborantoj.

DIVERSAJ NOVAĴOJ

malgajigaj...

La 24an de Oktobro forpasis la veteranino de la Avinjona Eo-asocio, Simone Humm.

La 21an de Novembro mortis en Avinjono alia tre konata esperantisto : André Gente.

Li kaj lia edzino malkovris Esperanton kiam ambaŭ estis junaj instruistoj.

Ili laboris kun la fama pedagogo Célestin Freinet kaj instruis laŭ ties « revolucia » metodo, kiu havas lian nomon.

Kiam franca televida kanalo proponis munti artan filmon pri Freinet, André Gente instruis al la geaktoroj la frazojn, kiujn il diru en Esperanto.

Li estis tre agema esperantisto kaj apartenas al tiu kategorio, kiu iom post iom malaperas : senlaca instruanto, peranto, varbanto en alternativaj medioj (ekz. ĉe junulargastejoj), organizanto, partoprenanto, redaktanto.

La Avinjona grupo perdas valoran homon.

La membraro de Espéranto-Provence sincere funebras kaj kondolencas ambaŭ familiojn kaj la Avinjonan klubon.

kaj pli agrabla...

Ni ĝojas bonvenigi novan membron de nia federacio : Huguette Bievliet, kiu loĝas en Allemagne-en-Provence (04) kaj iĝis ano de EKEM (Manosque).

Diversaj...

● Fin de la collecte de signatures ! La campagne « Espéranto au bac », organisée conjointement par Espéranto-France et SAT-Amikaro, et parrainée par Albert Jacquard, a beaucoup mobilisé, preuves en sont les 33 380 signatures collectées. La campagne est au-

jourd'hui arrêtée.

Et maintenant... La pétition sera présentée publiquement. Chaque parlementaire sera informé par courrier du résultat de la collecte et il lui sera demandé de bien vouloir soutenir la demande de reconnaissance de l'espéranto comme option au bac auprès du ministère. Par la suite, le bilan de la campagne sera présenté à la presse. Que chaque association locale n'hésite pas à mettre en place sa propre conférence de presse pour la presse locale et régionale.

Enfin, un rendez-vous sera demandé au ministère de l'Éducation nationale pour remettre les signatures et présenter la demande des associations espérantistes de France.

● Esperanto-Aktiv est une lettre d'informations éditée par Espéranto-Jeunes et Espéranto-France. Elle est destinée à faire connaître les opportunités qu'offre la langue internationale Espéranto. Vous pouvez lire la version en ligne sur :

<http://esperanto-france.org/esperantoaktiv>

● Le très dynamique journaliste globe-trotteur Antoine de Maximy (animateur de l'émission "J'irai dormir chez vous" cf :

http://fr.wikipedia.org/wiki/J%27irai_dormir_chez_vous)

s'est vigoureusement prononcé en faveur de l'espéranto dans le cadre d'une série de vidéos (produites par la revue participative de réflexion et d'information "Contre-feux") où diverses personnalités étaient interrogées sur la première mesure qu'elles prendraient si elles étaient élues à la présidence de la République Française.

La courte vidéo concernant la réponse d'Antoine de Maximy est visible sur le site : <http://www.contre-feux.com/hors-serie-video/episode-8-antoine-de-maximy/>

- "Muzaiko": tuttempa Esperanta retradio : <http://www.radionomy.com/FR/radio/muzaikoinfo/listen>
- Proposition de grand calendrier de table. 1 calendrier coûte 2,50 à partir de 5 ex., se vend pour 4€ dans votre club. Tout contact via Thérèse Sabatier <terezasa@club-internet.fr>
- Campagne d'engagement de souscription » de Vinilkosmo lancée en septembre 2012. Vinilkosmo recherche une manière plus active et participative pour produire et publier de nouveaux disques d'artistes chantant en espéranto et invite tous ceux qui le souhaitent à décider quels projets d'albums seront produits et publiés. Dans ce but Vinilkosmo a lancé une « campagne d'engagement de souscription » dans laquelle sont présentés divers projets et pour lesquels les gens doivent faire un engagement d'achat afin de pouvoir les publier. Ne seront publiés sur CD que les projets qui recevront suffisamment de promesses pour couvrir les frais de production et de publication. Si le minimum n'est pas atteint le CD ne sera pas publié, mais il sera étudié la possibilité, si les engagements le permettent, de ne publier le projet que sur les plate-formes de téléchargement.

Il est évident que si le projet ne rassemble pas assez d'engagements celui-ci sera abandonné. Ceci dépend de vous et de vos souhaits.

Pour participer il vous faut utiliser l'internet :

- aller sur le document google en cliquant ici <http://goo.gl/5pvMO>
- cocher les cases des projets d'albums des artistes que vous désirez soutenir puis choisir le format souhaité (Album Physique CD, mp3, ogg ; Flac sans perte)
- indiquer la quantité, saisir vos noms prénoms adresse postale et mail
- signer en indiquant votre nom et soumettre votre requête

- La verko de Michel Eliard kaj Patrick Pappola : « Il suffit de passer le pont », plu iras sian vojon kaj plu interesas la ĵurnalistojn.

La Ciotat-Info n° 121 - nov

Manifeste pour une nouvelle civilisation



Patrick Pappola



Michel Eliard

OUVRAGE

Ils ont choisi Brassens pour titrer leur premier ouvrage en commun. « Il suffit de passer le pont... », *Manifeste pour une nouvelle civilisation*, exhorte l'Homme à s'indigner d'être mis de côté par le progrès et lui recommande de franchir l'étape suivante. Question de survie, peut-être... Michel Eliard, 76 ans, retraité de la Fonction publique et dessinateur, et Patrick Pappola, 40 ans, instituteur à Aubenas et membre du réseau des enseignants en résistance pédagogique (les désobéisseurs) ont eu à cœur de démontrer « le mythe du progrès », à partir notamment des idées de Gilbert Durand, philosophe et anthropologue, connu pour des travaux sur l'imaginaire et les mythes. Les deux auteurs donnent ainsi aux lecteurs, en toute humilité, leur position sur des sujets aussi importants que le social, la communication, l'écologie, ou encore les finances et le patrimoine. Et tentent de démontrer que se cachent de réelles volontés de puissance et d'appropriation, sous couvert d'un soi-disant progrès... L.R.

« Il suffit de passer le pont... » de Michel Eliard et Patrick Pappola, éditions Edilivre (9,50 euros)

CHATUZANGE-LE-GOUBET / *Drôme Hebdo* du 27 septembre 2012. N° 3294

LITTÉRATURE - Rencontre avec un auteur local, Michel Eliard, passionné d'Espéranto

« Il suffit de passer le pont »

L'éclectisme était au rendez-vous du salon des auteurs des Compagnons de la Plume, dimanche dernier, à Chatusange-le-Goubet. Confirmés ou débutants, poètes, nouvelles, romanciers, biographes, historiens, etc. Quarante écrivain(e)s étaient venus présenter leurs ouvrages et partager leur passion pour la littérature, l'écriture, les mots et les idées.

Sur les tables, on pouvait, au choix, rêver avec « M. Moustache » (une histoire écrite par Charlotte Bégard et illustrée par Agnès Doney aux éditions TROT pour petits et plus grands), partir pour « Un sublime voyage » (roman de Josepha Petit, éditions Lemeditte), admirer des « Reflets d'encre » (sixième recueil de poèmes de Jeanine Biehler, éditions JB Poésies), ou encore rencontrer « La sorcière de Beauvoile » (portrait d'une médium, de Thérèse Massa, éditions Béné-

vent). La liste n'est pas exhaustive. Parmi les titres exposés, « Il suffit de passer le pont », manifeste pour une nouvelle civilisation, a piqué la curiosité de *Drôme Hebdo*. Son auteur Michel Eliard, 76 ans, dessinateur d'ouvrages d'art à la retraite, militant pour le réseau « sortir du nucléaire » et locuteur passionné d'Espéranto, entre autres. Co-auteur du manifeste avec Patrick Pappola (absent ce jour), 40 ans, instituteur à Aubenas et membre du réseau des enseignants en résistance pédagogique (les « désobéisseurs »), l'écrivain n'avait pas vraiment au départ une vocation d'écrivain. Cet homme, qui se sent l'âme « anarchiste » et écologiste, a tout de même collaboré à l'écriture de cet essai sur un sujet qui lui tient à cœur : « changer le monde en profondeur ». Mais c'est en toute humilité qu'il s'adresse à ses lec-

teurs, ne souhaitant en aucun cas « nous asphyxier de théories ». Il s'appuie plutôt sur les idées de Gilbert Durand, philosophe et anthropologue connu pour des travaux sur l'imaginaire et les mythes, pour expliquer que les maux de notre monde prennent leur source dans le « mythe du progrès ». Selon Michel Eliard, « on vit dans le mythe du progrès » et de ce fait, « il n'y a pas de sorties possibles avec des réformes ponctuelles mais par la conversion radicale des imaginaires » (p. 7 du manifeste). « Il suffit de passer le pont. » (27 pages) est édité chez Edilivre classique collection. Pour plus d'informations : consulter le blog www.bifurc.fr.



Michel Eliard a participé au salon des auteurs dimanche 23 septembre pour présenter son ouvrage : « Il suffit de passer le pont ».

CH. LY (CLP) nom de Lingvo Internacia (Langue Internationale), sous le pseudonyme de Doktoro Esperanto (Docteur qui espère), d'où le nom sous lequel la langue s'est popularisée par la suite. Le manifeste de Michel Eliard est déjà traduit en Espéranto.

LA FEDERACIANOJ ESPRIMAS SIN...

prozpoeme...

Rozo por Kristnasko

La juna helebora ŝoso estis senespera : ĝi tiel luktis por elteriĝi de la malmola kaj malvarmega grundo, ke restis nur tri semajnoj por kreski kaj ekflori ĉar la planteto revis flori la kristnaskan tagon, kvazaŭ tiu florado ŝanĝus la mondon.

Tiam ĝi strebis doni al si rimedojn por pleumi sian celon. Por dikiĝi kaj kreski, ĝi trinkis ĝis la lasta guto la matenan roson, ĝi gluteme sorbis la sunradiojn, kiam la suno bonvolis montriĝi. Sed ĝi timis la venton, kiu foje preskaŭ ĝin elradikigis. Ĝi sentis sin tiel malforta, ke ĝi malesperis sukcesi.

Tiam, knabineto kun vinkebluaj okuloj rimarkis ĝin kaj ofertis al ĝi sian amikan ĉeeston. La malgranda heleboro, refortigita de tiu varma bonkoreco, rekuraĝiĝis. Supre de ĝi, maljuna kverko movetadis siajn brunajn foliojn por montri sian subtenon. Birdoj, amikece, alportis al ĝi kelkajn berojn ruĝajn kaj brilajn. Hirta lekanteto rakontis al ĝi anekdotojn pri kokcineloj. Tiel subtenita de siaj novaj amikoj, la juna ŝoso rapidege kreskis. Ekde nun, ĝi sciis, ke dank' al tiu valora helpo, ĝi sukcesos venki la obstaklojn, kiuj okazos survoje. Kiam la knabineto vizitis ĝin la 25an de Decembro, ŝi miris : la eta heleboro malfermis sian perlamotan korolon kaj ĝia ora koro brilegis sub la sunradioj.

« Estas la plej bela kristnaska rozo », diris la eta knabino kaj : « Mi deziras ĝin donaci al ĉiuj homoj ».

Tiam la ĝardeno ŝajnis tremi kaj granda fluo de amo trairis la tutan Teron. Ĉie en la mondo floris la paco dum esperkantoj supreniris ĉielen. Tiam la homoj etendis la manon unu la aliajn, la ridetoj ekreaperis sur la vizaĝoj de la stratinfanoj, de la neamatoj,



Heleboro

de la soluloj, de ĉiuj suferantoj. La tempo de la partigo, de la reamikiĝo finfine alvenis : tio estis la kristnaska miraklo, kiu faris de nia planedo mirindan amĝardenon.

Ĉu estas ek-

cese deziri, ke tiu kristnaska paŭzo daŭru ĝis la fino de la tempoj ? Dependas nur de ni konstrui novan mondon, fari de nia vivo lumrozon.

« Ĉio estas ebla al tiu, kiu kredas, ankoraŭ pli al tiu, kiu esperas, ankoraŭ pli al tiu, kiu amas. »

Michèle Freud



poezie...

Idilio


Ŝajnas mi ĝoja kiel fringo
Printempo tiel min konas
La simpla parfumo de rozo
Inspiras min lanĉi kanton.

Mia kor', ŝia kor' unisone
Realigis sian osmozon
Estas mi ĝoja kiel fringo
Printempo tiel min konas.

Ebriigita de milda tremo
Pro ameto ĵus disvolviĝinta
Mi neniam sentas min malgaja
Sen afekto mi povas konfesi
Estas mi ĝoja kiel fringo.

Pierre Tomeï

el la franca originalo tradukis Anita Collomb



*Pierre Tomeï,
poeto
el
Saint-Raphaël*

IOM DA HUMURO

pro unu komo !

Veninte de la banko, kie ŝi havis disputon kun la kasisto, iu sinjorino diras al sia amikino : « Vere tede, kian scenon faris tiu stulta kasisto por unu mislokita komo ! »

Vivasekuro

Edzo, reveninte hejmen : « Karulino, mi ĵus asekurigis mian vivon ! » « Ho, tio ŝajnas al mi vere tre praktika. Mi do de nun ne plu bezonos tuj kuri al kuracisto, kiam vi estos malsana. »

Malnovaj gefianĉoj

« Petro, antaŭ 15 jaroj ni gefianĉiĝis. Kion vi pensas : ĉu ne estus jam tempo por edziĝo ? » « Jes, jes, Elizabeto, tion ankaŭ mi jam pensis... Sed kiu ankoraŭ prenos nin, nun ? »

VENONTAJ RENDEVUOJ

Januaro 26

Reĝkuka festo ĉe Monique kaj Pierrot Prezioso
(pli en la bulteno)

Februaro 2-9

Ekspozicio pri Esperanto en Le Beausset (pli en la bulteno)

Februaro 26

Koncerto de JoMo en La Ciotat (pli en la bulteno)

Marto 9-16

Mediterranea Esperanto-Semajno en Les Issambres

Marto 10

Ĝenerala Membro-kunveno de Espéranto-Provence en Les Issambres

Marto 18-23

Esperanta Semajno en Manosque (pli en la bulteno)

Majo 4-11

Le prochain congrès national d'UFE se tiendra à Artigues-près-Bordeaux en Gironde, en commun avec le congrès international des Cheminots .

Novembro 16-17

Eŭropa Rendevuo proponita de la Norfrancia Esperanto-Federacio, en Stella-Plage (apud Le Touquet). Ĉijare, temos pri La 25a Rendevuo.

Por festi tiun datrevenon, la organizantoj starigos atelieron de polifoniaj kantoj, gvidatan de Franjo Lévêque, kondiĉe, ke estu sufiĉe da interesantoj kaj kantemuloj.

Ili bezonas pli precize koni ĉiujn interesatojn persone por sendi al ili informojn, kiam necesos difini la enhavon de tiu ateliero.

Se vi interesiĝas, bonvolu sendi mesaĝon al Arlette Plutniak, prezidanto de la Norda Federacio : edmond.plutniak@free.fr

Kompreneble, tio ne estos firma aliĝo, nur antaŭvido por organizi la aferon serioze.

Limdato por sendo de publikotaĵoj por la venonta numero :
15a de Marto 2013

Bonvolu sendi al : p.vilain83@orange.fr

Antaŭdankojn pro viaj kontribuajtoj